

Hermann Löns,
Lüneburga erikejo

tradukita de Oskar Breddermann

1. Lüneburgan erikejon
en mirige bela land'
mi trapasis ĉiuloken,
multon montris voja rand'
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

3. Fratoj, lasu glasojn tinti;
ĉar la muskatela vin'
acidiĝus pro maluzo,
tial ne eltrinku ĝin.
Faleri, falera
ho: karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

3. Ruĝajn cervojn ni ekĉasu
gaje en arbaro, dum
niaj hundoj laŭte bojas
kaj pafiloj krakas "bum".
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

4. Vi belega, vi ĉarmega
kvazaŭ lakt' kaj sango, flor';
ni anime kunligiĝu
kaj nin amu kor' al kor'.
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

...

Hermann Löns,
Sur la Lujneburga erikejo

tradukita de Manfred Retzlaff

1. Lujneburga erikejo,
Vi mirakle bela land'.
Tramigrante vin mi trovis
Multon ĉe la vojo-rand'.
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion:ja.

2. Fratoj, ni tintigu niajn
Glasojn, ĉar la juna vin'
Netrinkite acidiĝos.
Do, ni nun eltrinku ĝin
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion ja.

3. Kaj la hundoj, ili bojas,
La pafilo, knalas ĝi,
Ruĝojn cervojn volas ĉasi
En arbaro verda ni.
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion ja.

4. Ho, vi rava belulino,
Bildo lakta-sanga vi,
Niajn korojn intersanĝu
Ni, ĉar bonas tio ĉi.
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion ja.

...

*Traduko de la Germana poemo "Auf der Lüneburger Heide" de HERMANN LÖNS (*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de Oskar Breddermann.*

Arg-624-1262 (2012-10-23 21:11:11)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kantlibreto "Jen la kanto de l' vojaĝ", eldonita de Dansk Esperanto-Forlag en la jaro 1973, represita de D.E.F. (Dana Esperanto-Federacio).

*Traduko de la Germana poemo "Auf der Lüneburger Heide" de HERMANN LÖNS (*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-624-1261 (2012-10-22 23:12:20)

Pri la aŭtoro vidu la retejojn http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns kaj <http://www.loens-verband.de/>.